

J. F. M. Baruel,  
Gand. Paris

N-ro 6

Decembro

1912

★ ESPERANTISTA ★  
GAZETO  
**DANLANDO**




Sub redakcio  
de  
**ANDR. NISSEN**



Eldonejo Esperantista  
**KOPENHAGO**






**Serio**  
de  
**Konataj Danaj Esperantistoj**



*Sino Wilhelmine Lovgreen.*  
(Kopenhago)

Nia vojaĝanta epostolino  
Estrarmembro  
de «Societo de Danaj  
Esperantistoj».



*Sro M. Packness.*  
(Vejle)

Prezidanto de  
«Esperanto-Klubo de Vejle».  
Delegito de U. E. A.  
Eldonisto de lernolibroj kaj vortaroj.



## La VII Propaca-Kongreso en Kristiania Juli 1912.

„Norvega Esperantisto“ skribas pri internacia helplingvo dum la VII Propaca-Kongreso en Kristiania la 16—17 Julio 1912;

Laŭ propono de sveda urbestro, Sro *Lindhagen*, la kongresanoj akceptis jenan rezolucion:

„La kunveno certe komprenas la pli kreskantan bezonon de mondlingvo aŭ internacia helplingvo sed opinias, ke internacia diskutado de ĉi-tiu afero devas antaŭiri la solvon“.

„Norvega Esp.“ opinias, ke Sro *Lindhagen* faris sian proponon konsiderante la nunan idistan movadon en Svedujo (kiu cetere atingis la pinton kaj nun bone malprogresas dank' al la energia laboro de niaj svedaj samideanoj, kiuj nun denove vekigis).

La delegito de U. E. A. en Kristiania diris, ke la afero jam estas efektive decidita per la rezolucio de la raskongreso en Londono 1911. Laŭtleginte la rezolucion li aldonis, ke estas malutile kaj malsaĝe disigi sin de la komunaj klopodoj de la Bontemplanoj, la Kristana Celado kaj aliaj internaciaj asocioj, kiuj jam uzas Esperanton kiel sian helplingvon. La projektita internacia diskutado estas tute ne necesa, sed plifortigante la ĉefideon, ĝi certe nur estos granda venko por Esperanto. Tial li voĉdonis por la proponita rezolucio.

En „Fredsbledet“ (la dana propaca organo) de 15. Sept. la sama afero estas priparolata kun la aldono, ke ĉi-tiu rezolucio estos sciigata al „la Mondlingva Oficejo“ en Bern (Verband für die Schaffung eines Weltsprache-Amtes). e

Mi miras, ke la delegito de U. E. A. vera voĉdonis por la rezolucio kun ĉi-tiu aldono, ĉar ĝi tuj montras la tendencon de la afero. Sed eble la delegito ne sufiĉe bone konas la institucion, kiu sub neŭtrala standardo nur estas kaŝita idista entrepreno.

Sro *Lindhagen* estas tre konata propagandisto de la ideo pri internacia helpa lingvo, sed ĉiuj skandinavaj esperantistoj ankaŭ bone scias, ke li ne apartenas al ilia tendaro.

Estas lia kutimo ne priparoli la nomon de tiu lingvo, kiu havas lian simpation. Kiam li en 1911 prezentis proponon pri internacia lingvo al la sveda parlamento (dua ĉambro), li mem diris, ke li konas nek Esp. nek Idon kaj tial ne estas ano de unu nek de alia.

Samtempe aliaj personoj, i. a. Sro *Wavrinsky*, pli detale priparolis la oficejon en Bern.

Denove Sro L. en Kristiania preparolis ĝin kaj proponis la peron de la oficejo.

Kiel eble niaj legantoj memoras, la oficejo en Bern kaj la ligo kresta por la starigo de la oficejo estas entreprenoj de Prof. *Ostwald*, kaj rimarkeble estas, ke nur estas la amikoj de O., kiuj interesas sin por ĉi-tiu „neŭtrala afero“. Tralegante la jaran raporton de la unua jaro (1911), mi trovis inter la 112 membroj 30 ĝis 40 al mi konatajn nomojn de idistoj, dum mi ne trovis eĉ unu de esperantisto konata al mi. La sola esperantisto, pri kiu mi scias, ke li aniĝis, estas la konata Sro *Jacob Schmidt*, Bern, kiu kune kun alia esperantisto estis invitata en la lasta momento por ĉeesti la fondon de „la ligo“. Sro Schmidt cetere estis eljetita de la ligo pro la artikoloj en „Germana Esperantisto“, en kiuj li senŭualigis la entreprenon.

Oni efektive vidas, ke ĝi estas starigita por anstataŭi la delegacion, nur ne estas la intenco elekti inter la jam ekzistantaj internaciaj lingvoj iun, kiu estos la estonta helpa lingvo; sed la tasko de la ligo estas peti al la universitatoj, instruaj institucioj kaj komercaj ĉambroj de la ĉefaj civilizitaj landoj, ke ili fondu „Laboran Komision“, kies tasko estus elekti inter la ekzistantaj lingvoj tiun, kiu sebezone perfektigitan, laŭ plej freŝdataj lingvaj laboroj(!) povus esti proponata por alpreno al la tuta mondo.

Kiel oni vidas, estas la intenco krei tute novan lingvon; sed la vera intenco, kiu sin kaŝas malantaŭ ĝi, oni facile divenas.

„Franca Esperantisto“ en bonega artikolo „Non bis in idem“ (havebla en special-presajo) skribas, ke „la esperantistoj kaj la veraj amikoj de la lingvo internacia fariĝus, ankoraŭ unu fojon pli, trompitaĵ, se ili aliĝus naive al la funkciado de tiu nova batalmaŝino, tro simila al la mitologia ĉevalo de la Troja milito.

Lingvo internacia ne estas kreota, ĝi jam ekzistas, Esperanto estas ĝia nomo! Ni esperantistoj ne okupu nin pri la „ĉevalo de Troja“ kaj ne enlasu ĝin en nian tendaron.

Esperanto jam bone enradikiĝis en la vicoj de la propacaj amikoj, mi nur volas citi kelkajn nomojn de famaj pacifistoj: *Alfred H. Fried*, Senatano *Lafontaine*, direktoro de la propaca oficejo en Bern, Barono *d'Estournelle de Constant*, *Felix Moscheles* kaj la ĵus mortinta *William Stead*.

Diversaj propacaj kongresoj ankaŭ jam esprimis la deziron, ke Esperanto estu permesata flanke de la aliaj lingvoj (ekz. la 4a franca, Lyon 1906, kaj la 16a internacia, München 1907).

## DANLANDO

?  
Kiel do ne ĉiam esprimi la saman deziron, des pli multe, ĉar nun fondiĝis nova societo esperantista por la paco, kies titolo estas „Pacon per Esperanto“. Se iu proponas la peron de la mondlingva oficejo en Bern, ni forte protestu, kaj antaŭ ĉio ni sekvu la okazintaĵojn rilate al nia movado kaj al la kontraŭmovado, tiel ke ni ne pro nescio falu en ruze starigitajn kaptilojn.

La bezono de la nova ligo estas granda; certe ne mankas esperantistoj en la naciaj propacaj societoj, sed ĉi-tiuj malgrandaj grupoj mankas apogon en la laboro, entute mankas super-organizaĵoj, kiu povas gvidi la propagandon en la propacaj rondoj.

Fine mi nur volas rakonti, ke en la kopenhaga fako de la dana propaca societo troviĝas multaj esperantistoj, kiuj ĉiam ĉeestas la kunvenojn kaj laŭpove propagandas nian lingvon.

Margrethe Noll.

## Originala Esperanto-poemo.

Dum la III kongreso en Terrassa de la „Kataluna Esperantista Federacio“)“ okazis kiel kutime *La Floraj Ludoj*, Ĉi-sube ni represas la belan poemon, kies verkisto, Sro *Clarence Bicknell* ricevis la unuan premion pro originala poezio. Krom la unua premio la juĝantoj ankaŭ aljuĝis al li la „Naturan Floron“.

Kiel reĝinon de la festo Sro Bicknell elektis Finon Concepció Puig, al kiu la simbola bukedo el naturaj floroj estis transdonita, kiam ŝi eniris la scenejon de la nova granda teatro „Principal“, kie la premioj estis disdonitaj.

Ĉar la premiita poeto mem ne povis ĉeesti, li delegis Sron Valenti Alavedra por reprezenti lin, kaj estis li, kiu akompanis „la reĝinon“ en la scenejon, kie sidis la aŭtoritatuloj; la ĉeestantaro, kiu preskaŭ plenigis la teatron, starante salutis la ĉarmen reĝinon kaj ŝian aman kortegon, kiu konsistis el 6 junaj belaj fraŭlinoj, ĉiuj fervoraj esperantistoj.

### Versaĵo pri Amo.

Kiam lunradioj dancis  
Sur la maro orienta,

Ĝis la vasta oceano  
Ŝajnis nur spegul' arĝenta;  
Iuj, kiel vojaĝantoj  
Lacaj, sur la supro haltis;

La  
\*) Al Kataluna Esperantista Federacio aniĝis ĝis nun pli ol 50 grupoj kaj ĉ. 500 membroj izolitaj.

## DANLANDO

Iuj, hejmen sopirante,  
En ĉielon ree saltis;  
Sed aliaj, pli kuraĝe,  
Kiel infanar' sen timo,  
Subakviĝis kaj sin kaŝis  
Sur la roka marpavimo,  
Kie ili refariĝis  
Briletanta lunetaro,  
Perloj el arĝenta lumo,  
La trezoro de la maro,  
Serĉu ilin, se vi volas,  
Kaj se perloj vin konsolas;  
Sed ne estas la trezoro  
Ili por malgaja koro.

Ankaŭ ĉar la ter' profunda  
Nigra estis, sen koloro,  
La stelaro ĝin rigardis  
Simpatie kun doloro;  
Kaj rapidis la radioj  
De la suno. de la steloj,  
Por ornami la dezerton  
Kaj ĝin semi per juveloj.  
Or'topazo kaj smeraldo,  
Diamanto kaj rubeno,  
Tie loĝis kaj briladis  
Kiel floroj en ĝardeno.  
Dum miljaroj ili restis,  
Helaj lampoj en karcero,

(Sholefangal)

De la supra mond' kaŝite,  
La trezoroj de la tero.  
Se vi serĉi ilin povos  
Eble vi per peno trovos;  
Sed ne estas la trezoro  
Ili por malgaja koro.

Jen juvel' alia kuŝas  
Ne en malproksimaj lokoj,  
Nek kaŝite sub la ondoj,  
Nek dormante en la rokoj;  
Ĝi trezor' mirinda estas,  
Naskiĝinte en ĉielo,  
Pli valora ol la lumo  
De la sun' aŭ ia stelo.  
En la homa koro vivas  
Fajro el la dia flamo,  
La trezoroj el trezoroj  
Kies nomo estas Amo.  
Tiu estas la juvelo  
Kiun ĉiu koro tenas;  
Eĉ malforta kaj timema,  
Ĝi la tutan mondon benas.  
Amon serĉu per laboro;  
Amon gardu kun fervoro,  
Amo estas la trezoro  
Por ĝemanta homa koro.

(el »Kataluna Esperantisto«.)

## Kloden rundt

**Italien.** Takket være Prof. *Cesare Massone*, Direktør for den tekniske Aftenskole Mameli i Genova, er Esperanto nu optaget som regulært Fag i alle Skolens Klasser. Over 300 unge Mennesker fra 12 til 18 Aar lærer Sproget her. 5 Lærere fra Liguria Esperanto Institut giver gratis Undervisning ved Skolen hele Aaret rundt. Ialt

## DANLANDO

er afholdt 6 Kursus. I den tekniske Skole Baliano er nu ligeledes begyndt et Kursus i Esperanto. Desuden afholdes der for Tiden Kursus i Arbejderforeningen for Arbejdere og Handelsbetjente og i Socialistforeningen for unge Socialister.

**Rimini.** Et Kursus afholdes for Tiden for Lærere fra Byen og Omegn, 60 Deltagere lærer her Esperanto under Præsten, Prof. *Modesto Carolfis* Ledelse. Man er ved at danne en Forening i Byen, Borgmester Facchinetti har lovet at være Præsident.

**Schweiz.** I Genève er der dannet en ny Klub paa over 100 Medlemmer.

**Ungarn.** Kultusministeriet har givet Tilladelse til at der afholdes Kursus i Esperanto ved det tekniske og videnskabelige Universitet.

**Galicien.** I Byen Kolomea er der i Løbet af 7 Maaneder afholdt 6 Kursus, hvori c. 200 Personer har deltaget.

**Bucuresti.** Direktøren for den „Lutheranske Skole“ har givet Tilladelse til, at der hver Søndag afholdes 2 Kursus for Eleverne i Skolens ældste Klasser. Skolen er en af Byens mest ansete.

**Australien.** I Oktober afholdtes i Melbourne den II Australske Esp. Kongres. Paa Raadhuset blev Esperantisterne modtaget af Borgmesteren, der med Forundring hørte om Esperantos store Udbredelse. Ved et stort Møde, hvor 500 Personer var tilstede, talte Ministeren for offentlig Undervisning om Nødvendigheden af et internationalt Sprog, og han lovede, at hans Departement skulde overveje Sagen. Endvidere fortalte han, at han næste Aar vil foretage en Rejse til Europa, saa vil han sikkert ofte i det praktiske Liv møde Esperanto paa sin Vej, og vi haaber, at Esperanto atter her maa erobre en af de Mænd, der opvejer mange andre, en af dem, der kan gøre noget virkeligt for Esperanto.

**Belgien.** I Bruxelles holdt den kendte Idist Chalon for nogen Tid siden et Foredrag om Ido i „The Anglo-American Institute“. Mange Esperantister var tilstede og bad Taleren om Forklaring paa forskellige grammatiske Spørgsmaal; Forklaringerne blev givet saa uklart og daarligt, at de ikke tilfredsstillede Spørgerne



eller de øvrige i Forsamlingen, og Ido fik ved denne Lejlighed et alvorligt Slag. Præsidenten for Instituttet besluttede endogsaa at sætte Esperanto paa Skolens Program. Dette kan Esperantisterne altsaa takke Hr. Chalon for. Det er for øvrigt mærkeligt, at de belgiske Idister ikke snart kan forholde sig rolige, naar de Gang paa Gang bliver sat til Vægs af Esperanto, selv naar de har deres Spidser i Ilden.

**Finland.** I Åbo har en anden Idist haft et lignende Uheld, nemlig Prof. Wallensköld, som den 3. Nov. talte paa Universitetet om „Verdenssprog og Hjælpesproget Ido“. Esperantos Udbredelse kendte Professoren kun til Aaret 1907 (!).

Den følgende Dag fremkom der i „Åbo Underrättelser“ et længere Referat af Talen, som den bekendte Esperantist Albin Sandström i næste Nummer af Bladet gendrev, idet han samtidig fortalte om Esperantos storartede Udbredelse netop efter Idos Fremkomst.

Den 23. Nov. holdt Prof. W. den samme Tale i Nyfilologisk Selskab i Helsingfors. Da Foredraget havde været annonceret i Bladene, var Salen omtrent fuld, bl. a. var mange Esperantister mødt.

Efter Foredraget begyndte en meget ivrig Diskussion, der varede i 3 Timer under Prof. Hugo Snolahtis Forsæde. Særligt bevistes Idos Vanskeligheder af Esperantisterne Sandström, Magister W. Antila og Setälä. Sandström talte desuden om Esperantos Fremskridt efter Idos Fremkomst, hvorledes Foreningerne var gaaet op fra omtrent 700 til over 2000, medens det ikke var lykkedes Ido at hverve ret mange Tilhængere.

Prof. W. kunde tilsidst intet gendrive og maatte bekende, at han ikke kender Sproget tilstrækkeligt, og at han var forbavset over, at Esperanto virkelig har en saadan Udbredelse.

Folk, der ikke følger bedre med, burde ikke give sig af med at holde Foredrag om Ido, de gør let Sproget en Bjørnetjeneste. Synderlig kloge bliver de nu heller ikke ved at læse Idoorganerne, der lever af at skrive lange Artikler om det Esperanto, som efter deres Udsagn forlængst har udspillet sin Rolle og gaar sin Opløsning i Møde, og da Esperantobladene i disse Organer i Reglen omtales som nærmest hørende til Smudspressen, saa faar vel ingen Idister Lyst til at læse dem.

Naa, vi Esperantister kan jo kun glæde os, hver Gang Idisterne vover sig ud paa Glatis og derved hjælper vort Sprog til en Succes.

## DANLANDO

**Perth Amboy** (New Jersey). Det underjordiske Kabel Kompagni har antaget og bruger Esperanto og drager stor Profit deraf. Firmaet, der handler meget paa Syd-Amerika, har udsendt sine Reklamer og Annoncer paa Esperanto til de Lande, hvor der tales saa mange forskellige Sprog. Derved sparer man mange Annoncer paa de forskellige Sprog, og da Esp. jo er meget udbredt i disse Lande, har Firmaet allerede gjort gode Forretninger.

**Dresden.** Lærer *Funcke* fra Doehlen, der har undervist en Klasse Børn fra Kommuneskolen, demonstrerede dem for nogen Tid siden for det sachsiske Rigsdags andet Kammer. Virkelig en efterlignelsesværdig Maade at propagandere for internationalt Sprogs Indførelse i Skolerne.

**London.** I den bekendte Kirke Harecourt, Canonbury, London N. finder den anden Søndag i hver Maaned Kl. 3,15 en Gudstjeneste Sted paa Esperanto. Det er paa Opfordring af Harecourts Menighedsraad, at denne Gudstjeneste afholdes, idet man ønskede at byde Londons Esperantister et religiøst Hjem. Gudstjenesterne er selvfølgelig slet ikke sekteriske, saaledes kan enhver godt deltage i dem uden at støde an mod sin Samvittighed.

**U. S. A.** Paa de store amerikanske Krigsskibe er det blevet Skik og Brug at danne Esperanto Klubber. Vi læser saaledes, at Esperanto Klubben paa „Rhode Island“ har udvekslet Hilsner med Klubben paa „New Hampshire“. I Juli besøgte „Rhode Island“ Kubas Havn, og kubanske Esperantister benyttede Lejligheden til at aflægge Klubben Besøg. Det spanske-kubanske Blad „El Triumfo“ omtaler med Begejstring denne gode Ide og siger, at paa den Maade vil Sømændene altid i alle civiliserede Lande finde Venner, der vil gøre dem bekendt med de Steder, de besøger. Vil man sende Breve f. Eks. til „Rode Island“, da er Adressen: Esp. Klubo, U. S. S., „Rode Island“, care Postmaster, New York. N. Y.

**England.** Ombord i engelske Skibe dyrkes ogsaa ret ofte Esperanto. Paa Krigsskibet „Orion“ har f. Eks. 12 af Underofficererne dannet en „Esperanto-Messe“; naar de anløber Havne, inviterer de derboende Esperantister ombord og give dem en hjertelig Modtagelse.

**Dresden.** Vi omtalte fornylig *Firmaet Neuman & Co.* som et

af de Firmaer, hvor baade Chefer og Personale er Esperantister, vi kan hertil føje, at der blandt Fabrikkens Arbejdere findes 11 Esperantister.

**Brasilien.** Den II Brasilianske Undervisnings-Kongres, der i Oktober afholdtes i Bello Horizonte, Hovedstaden i Staten Minas Geraes, udtalte Ønsket om at Esperanto forsøgsvis maa blive undervist i alle Republikkens Skoler. I Staten Sergipe har Regeringen sanktioneret et nyt Regulativ for den offentlige Undervisning, approberet af Deputerkamret. I dette Regulativ tillades Esperanto-Undervisning i Normalskolen og i „Atheneo Sergipense“. Regeringen lønner de Lærere der underviser. — Saa langt er man naaet i Brasilien.

**Christiania.** Her har vor energiske samideanino Frøken *Finholdt* begyndt et nyt Kursus for Elever fra Kommuneskolens 2 øverste Klasser; 18 Børn deltager i Undervisningen.

Frk. F. har ogsaa et Hold ældre Elever, som nylig ved et Møde paa Skolen ved Sang og Oplæsning demonstrerede Esperanto.

»Urds« Redaktion, som er særlig velvillig overfor Esperanto har stillet Lokale til Raadighed for Frk. F. som ogsaa her har begyndt Kursus.

**Trondhjem.** I den kommende Vinter arrangeres en Esperanto Udstilling.

**Lyon.** Den bekendte Professor i Oftalmiatri, Dr. *Dor*, Præsidenten for „Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio“ (T. E. K. A.) er fornylig afgaaet ved Døden i en Alder af 76 Aar. Af Fødsel var Dr. D. Schweizer, og han beklædte i en lang Aarrække Posten som Direktør ved Universitetet i Bern. I Lyon, hvor han døde, har han virket i over 20 Aar til Velsignelse for Tusinder af Mennesker. Blandt alt hans menneskekærlige Arbejde, er hans Arbejde for Esperantosagen ikke blandt det ringeste, ham skyldes det, at Lyon blev et af Brændepunkterne i Esperantobevægelsen.

**Esperanto-Parkbyen ved München.** Om 2 à 3 Aar mener man denne Esperantoby vil være helt færdig; der arbejdes ivrigt med Planerne, Chefarkitekt Sievers leder Arbejdet. Propaganda Ligaen vokser fra Dag til Dag og tæller allerede mange betydelige Navne, vi nævner nogle: Generalleutenant *von Belli de Pino*, Major

## DANLANDO

Ludwig de Jarres, begge attacherede Hoffet, Friherre von la Roche, Baron Karl von Branca, Baronesse Rosa von Karg-Bebenburg, Grev Josef Pestalozza, Grevinde Elsa Pestalozza, Grev Adolf Westarp o. m. fl. Som bekendt kan Grundene i Byen kun sælges til Esperantister eller til Familier, blandt hvis Medlemmer der i det mindste findes en Esperantist. Man har til Hensigt at koncentrere alt, hvad der vedrører Esperanto her i denne By.

**Národni Obzor**, et bøhmisk Ugeblad, bringer nu i hvert Nummer en Esperantorubrik.

**Rusland.** I Astrakan afholdes siden 16. Sept. officielle Esperantokursus i Handelsministeriets Handelsklasser, over 40 Personer deltager.

**Haag.** 12 Pigebørn fra Fagskolen har efter et Aars Undervisning i Esperanto selv dannet en Klub, der hedder „Ni restu fidelaj“.

**Rotterdam** har nu 6 Esperantoforeninger.



## Esperanto kaj la Brazilaj Parlamentoj.

La brazilaj parlamentoj, kaj la ŝtataj kaj la federacia, multfoje sin montris favoraj al Esperanto kaj kun intereso sekvis la movadon de nia lingvo.

„Brazilaj Esperantistoj“ (Nov.—Dec.) skribas i. a., ke „al la federacia deputatejo (Camera dos Deputados) apartenas nun kelkaj esperantistoj el la plej kleraj kaj batalemaj krom multaj deputatoj ĉiam favoraj al Esperanto. Ili estas: Kolonelo D<sup>ro</sup> *Moreira* Guimaraes, prezidanto de l’Esp. Grupo de Bahia, deputato de l’Ŝtato de Bahia; D<sup>ro</sup> *Antonio Carlos*, deputato de Minas Geraes; D<sup>ro</sup> *Correa Defreitas*, D<sup>ro</sup> *Dunshee* de Abranches, *Coelho Netto* kaj aliaj.

Kiel oni vidas Esp. estas bonege reprezentata, kaj dank’ al la klopodo kaj la morala apogo de ĉi-tiuj fervoraj esperantistoj niaj brazilaj samideanoj esperas, ke baldaŭ estos aprobita la projekto, per kiu la registaro donos al „Brazilaj Esp. Ligo“ ĉiujaran monhelpon:

## DANLANDO

En la parlamento de l'ŝtato Rio de Janeiro (Assembléa Estadoal) ankaŭ trovigas tre konata esperantisto, nome la honora prezidanto de la Brazila Ligo, D<sup>ro</sup> *Everardo Backheuser*. Antaŭ ne longe D<sup>ro</sup> B. prezentis al la parlamento leĝprojekton, per kiu de nun prefere estos elektataj por la ŝtataj oficoj kandidatoj, kiuj scias Esperanton. La leĝprojekto estis subskribita ankaŭ de aliaj kandidatoj. D<sup>ro</sup> B. faris je tiu okazo belan paroladon, pri kiu raportis ĉiuj gazetoj de Rio kaj Nietheroi.

Ankaŭ en la malgranda sed klera ŝtato Sergipe la parlamento okupis sin pri nia afero. Antaŭ nelonge la parlamento decidis kaj la registaro aprobis enkonduki Esp. en la Normala Lernejo kaj la Ŝtata Gimnazio. La profesoroj, kiuj instruas tie, estas pagataj de la ŝtato.

Ni kore gratulas niajn energiajn samideanojn en Brazilujo.

## Nia Lando

**Esperanto Unuiĝo de Danaj Instruistoj** ĵus elsendis novan propagandan poŝtkarton verde presitan. En dana lingvo ĝia teksto mal-longe rakontas, kio estas Esperanto, kaj donas ekzemplon pri la simpleco de ĝia gramatiko citante la finiĝojn de la ĉefaj vort-klasoj kaj de l'diversaj tempoj de la verboj.

Sur la teksta flanko de la karto troviĝas la adreso de la unuiĝo, alvoko al la instruistoj pri membriĝo en la unuiĝon, pri laboro por la disvastiĝo de Esp. en instruistaj rondoj, k. t. p.

Pli multe oni ne povas postuli sur poŝtkarto.

La prezo de la poŝtkartoj estas por membroj de la unuiĝo: 2 Øre po, kaj por ne-membroj: 3 Øre po.

Ili estas haveblaj ĉe la prezidanto, Fraŭlino Asta Mikkelsen, Reberbanegade 10 A, Kopenhago.

**Horsens.** Okaze de la naskiĝo-tago de nia Majstro la klubo aranĝis feston.


**Vejle.** Kapitano *Aae* el Horsens faris paroladon je la 5 Dec. en la Asocio de Komerc- kaj Oficejkunhelpantoj kun la rezultato ke nova kurso estis starigata. S<sup>ro</sup> *Egly* instruas.

## DANLANDO

**Aarhus.** Nova kurso por membroj de la Unuiĝo de komerc-kaj oficejhelpantoj“ komencos tuj post novjaro. — La loka Esperanto-organo, „La verda Espero“ eldonita de „Konversacia Klubo de Aarhus“, redaktata de Sro *Chr. Heilskov*, elsendis belan kristnaskan numeron, al kiu Sro *V. von Holstein-Rathlou* desegnis alegorian titolon, sur kiu vidas la babelan turon, la terglobon, la esperantan stelon k. t. p.

**Sparkær.** Nia fervora samideano, Sro *Ducholm*, kiu estas instruisto en tiu malgrande vilaĝo, komunikas al ni, ke li nun instruas ĉiujn infanojn de la lernejo en nia lingvo. Ni gratulas!

**Kopenhago.** Ordinaraĵ ĝeneralkunvenoj okazos en „Konversacia Esperantista Klubo“ la 30-an de Januaro kaj en „Societo de Danaj Esperantistoj“ la 23-an de la sama monato.



## Bibliografio.

Die „10 Vorzuge des Ido gegenüber Esperanto“, und 10 Antworten dazu; Sonderdruck aus: „Germana Esperantisto“. Von Dro *Paul Haller*, (Ader & Borel) Prezo: 10 Ekzpl. M. 0,20; 50 Ekz. 0,80; 100 Ekz. 1,50; 1000 Ekz. M. 12,50 senpage per la poŝto.

Jen bonega propagandilo. Ĉar ĝi estas germane skribita, ĝi estas tre uzebla en Danujo. Nia eminenta Ido-kontraŭbalanto donas ĉi-tie bonegajn respondojn al la ĉiamaj pretendoj de la idistoj kaj montras la superecon de Esp. en ĉiuj 10 punktoj. Ni rekomendas la bonan propagandilon al niaj legantoj.

**La instituto Milner de Jean Jullien**, Tradukita de la Lyona grupo. (Esperanto Biblioteko Internacia No 24) Ader & Borel G. m. b. H. Esperanto-Verlag, Dresden — A. 1. Prezo 10 Sd.

Tre sprite kaj amuze estas la priskribo de la „ama instituto“, kiun Sro Milner kun vere amerika komerc-talento starigis por helpi gejunulojn, kiuj deziras edziĝi sed ne havas sufiĉe da tempo por serĉi fianĉon; anstataŭ perdi tempon aŭ atendi sufiĉas, ke oni enskribu sian nomon ĉe Sro M., kiu prizorgos la necesan.

Tre rapide oni atingas rezultaton sed devas suferi amason da turmentoj, kiuj tamen laŭ Dro M. ne toleras komparon je la tur-

mentoj, kiujn la malsaĝaj junaj homoj en tiaj okazoj havigas al si mem.

**Princo Serebrjanij.** Historia romano de *Grafo A. Tolstoj*. Tradukita de Sino M. Tidlovskaĵa, Librejo „Esperanto“ Moskov, Tverskaja 26. Prezo Sm. 1,20.

Kiel literatura aldono de la gazeto „La Ondo de Esperanto“ aperis ĉi-tiu granda historia romano, kiu apartenas al la plej legataj en Rusujo kaj eĉ ekster ĉi-tiu lando, ĉar ĝi jam estas tradukita en multajn lingvojn.

La terura rusa caro, Ivan la Kruela, estas unu el la ĉefaj personoj en la romano, kaj tio sufiĉas certe por konvinkigi la legantojn pri interesa enhavo, cetere tre fidinda rilate al historiaj faktoj.

La libro estas bone tradukita, kaj la tradukinto ofte aldonas klarigajn rimarkojn, kiuj por eksterlandanoj faciligas la komprenon.



### Malfermita letero.

La gvidanto kaj aranĝanto de la 9-a kongreso en Italujo, nia eminenta samideano *Dro Alfredo Stromboli*, antaŭ kelka tempo elsendis sekvantan leteron, el kiu ni bedaŭrinde povas konstati personajn intrigojn kontraŭ sindona kaj energia viro, kiu senĉese laboris por la disvastigo de nia kara lingvo, kaj kies nomo estas konata inter la plej bonaj en Italujo. Ni forte bedaŭras, ke esperantistoj tiel povas forgesi la komunan celon, pro kiu ni laboras, ke ili komencas okupi sin pri personaj sentoj de fervora samideano.

(La Red.)

*Jen la letero:*

Estimataj samideanoj!

Pro la agado de kelkaj samnaciaj esperantistoj, kiuj por kontraŭbatali miajn personajn sentojn, kalumniis nian „Genova Esperanto Unuiĝo“, kontraŭstaris al la nacia Asocio, disvastigis antaŭ kelkaj monatoj la malveran sciigon, ke la 9-a kongreso ne okazos en Genova, disvastigis la famon, ke oni intencas fari la 9-an kongreson liberpensula kongreso, kaj semis konstante en la nomo

## DANLANDO

de la samideaneco la malkonsenton en niaj vicoj. penante ruinigi nian Societon, pro la malmulta tempo, kiu nune restas al mi libera de miaj privataj aferoj, mi estis bedaŭre devigita:

„por ne plu esti kaŭzo, ke oni malhelpu al sukcesplena laboro de la unua itala esperanta urbo;

por ke oni ne plu dubu pri la neŭtraleco, ekŝiĝi:

de Prezidanto de la Genova Esperanto Unuiĝo;

de Prezidanto de Itala Esperanto-Asocio; de Delegito de U. E. A.;

kaj de l'organiza komitato de la naŭa universala kongreso“.

Dro *Alfredo Stromboli*,

Via Gropallo, 5.

Genova.

## Literatura Parto

### Kristnasko ĉe niaj prapatroj.

Certe multaj opinias, ke la kristnask-festo havas nur kristanan devenon, sed tio efektive ne estas korekta, almenaŭ ne en nia patrujo, ankaŭ ne en la aliaj nordaj landoj.

La dana nomo „Jul“ tute ne rememorigas nin pri la naskiĝo de Nia Savinto, kiel faras la festnomoj en la aliaj eŭropaj landoj, nia „Jul“ certe signifas „rado“ (en dana lingvo „Hjul“), ĉar la jaro ĉe novjar-tempo turnas sian radon, kaj la nova jaro komencas, kaj tial oni dum la plej malluma tempo de l'jaro festis pro la revenonta lumo.

Niaj idolanaj prapatroj solenis tri grandajn festojn dum la jaro, en aŭtuno, fine de Decembro kaj en printempo. Ĉe ĉiuj tri festoj oni portis al la dioj grandajn oferaĵojn konsistantajn el diversaj bestoj, speciale porkoj kaj ĉevaloj.

La mezvintra festo estis la plej granda kaj solena el ĉiuj, ĝi komencis ĵus post solstico la 21<sup>an</sup> de Decembro kaj daŭris ĝis epifanio. Oni oferis al preskaŭ ĉiuj dioj kaj diinoj, sed precipe al *Odin* la plej eminenta, la patro de l'dioj kaj homoj.

La festo estis komuna kaj pagita de ĉiuj partoprenantoj. La reĝo, aŭ princo, aŭ eminentulo kunvenis kun la popolo de l'distrikto



ĉe la „domo de l'dio“, treege granda halo, konstruita el ligno, ĉirkaŭita de arbareto. La sanktejo estis malhela kaj havis preskaŭ teruran aspekton, la muroj estis gudritaj kaj sprucigitaj per sango de oferitaj bestoj. Ĉiutage la loko estis treege sola, tute kontraŭe dum festtagoj.

Ni imagu tian kristnask-matenon:

La neĝo kovras la larĝan placon, kiu ĉirkaŭas la sanktejon, tie kaj en la arbareto kolektiĝas la homaro de proksime kaj de malproksime, oni aŭdas la bruon de multnombraj homvoĉoj, la kriegon de la oferot-bestoj, la blekadon de l'ĉevaloj — kaj de la rajd-ĉevaloj kaj de tiuj, kiujn oni oferos. La biero kaj la bestoj estas portitaj al la estro aŭ la estroj, se estas sanktejo, komuna por pli multaj distriktoj. La homaro proksimiĝas al la sankta loko, la plej unua parto de l'festo, la serioza parto ekkomencas.

Serioza ĝi estas precipe por tiuj, kiuj devas fordoni la vivon, ĉar ofte oni eĉ oferis homojn, precipe sklavojn kaj krimulojn — tre malofte kamparanojn aŭ aliajn liberajn virojn.

La plej granda festo en Danujo okazis en Lejre, ĝi estis tre fama kaj priparolita eĉ de eksterlandaj verkistoj. Konata germana histori-verkisto, *Thietmai* el Merseburg, rakontas en la 10<sup>a</sup> jarcento, ke ekzistas en Danujo loko nomata Lederun (Lejre), la ĉefurbo de la lando, kuŝante sur insulo Selon; tie oni je ĉiu naŭa jaro kunvenas por porti al la dioj oferojn konsistantajn el 99 homoj kaj la sama nombro de ĉevaloj, hundoj kaj porkoj. Eble la fama verkisto iomete troigas, sed tamen estas fakto, ke hom-oferaĵoj estis ne maloftaj.

Ni sentas teruron, kiam ni pensas pri la mort-timo de l'malfeliĉaj homoj kaj bestoj, ni miras, ke vere estis konsiderata kiel honoro al la dioj kaj fest-gloro por la homoj. — Sed profunde en la animo de niaj praavoj restis sento de l'homa peko kaj ŝuldo, kaj peko kaj ŝuldo postulas sangon, vere ĉi-tiu estas mondhistoria leĝo; jen certe la klarigo de la verŝajna krueleco. Dum la mateno de l'tempoj okazis la falo, plej unue inter la dioj mem, pro tio la homaro devas batali. sed de el la batalo devenos la rekompenco. Ĉiu, kiu mortis en batalo fariĝis militisto en la granda armeo de *Odin*, ankaŭ la oferitaj homoj estis akceptataj de li, kaj tial oni faris honoron al la mortjuĝitaj krimuloj, akirante al ili lokon en „Valhalo“, la dia loĝejo.

Certe la oferado estis akompanata de paroladoj kaj kantoj, per kiuj oni laŭdis la diojn.

La mallonga vintro-tago rapidas ĝis la fino, la solena parto de

## DANLANDO

l'festo finiĝas, kaj la trumpetoj sonas alvokante al festĝojo, la homaro eniras la sanktejon, kiu nun fariĝis festhalo ornamita per helkoloraj tapiŝoj. La domo estas gaja, sed samtempe solena, ĉar la dioj ĉeestas, oni videtas 19 statuojn malsekajn pro sango. La viando de l'bestoj, kuiritaj en grandaj kaldronoj estas portata al la gastoj, kaj pokaloj plenaj je vino aŭ biero estas disdonitaj ĉirkaŭen.

Nun oni komencas toasti; la estro leviĝas kaj dediĉas la plej unuan toaston al *Odin* petante lin donaci al la reĝo feliĉon kaj venkon dum milito. La dua toasto estis dediĉita al la du dioj, kiuj donacis al la tero frukto-donon, *Njord* kaj *Frej*. Cetere oni ankaŭ rememoris *Tor*, la ŝatatan dion de ĉiuj bravuloj.

Post la memor-toastoj por la grandaj dioj, oni memoris siajn mortintajn praavojn, tiuj kiuj estis famaj kaj bravaj viroj.

Kompreneble estis nature por niaj batalemaj praavoj fari promesojn pri braveco, kaj multaj „viking-militoj“ estis projektitaj ĉe pokalo dum festo; la malnovaj islandaj legendoj rakontas pri tiaj promesoj, kiuj ja treege plaĉis al la eternaj dioj. — Super ĉio la honorsento plenigis la animon de l'kristnask-gastoj, estis la ĉeno, kiu kunligis ilin.

Ankaŭ la bela kutimo fari donacojn al amikoj kaj parencoj oni konas de la idolana festo, kaj eĉ ne la ĉarmega vorto „kristnask-paco“ havas kristanan devenon, ĉar ni scias, ke la sanktejo, la ofer-arbareto kaj la tula ĉirkaŭaĵo estis pactediĉita loko, kie milito kaj malpaco estis severe malpermesata. La leĝoj grave punis malobeon al tiu-ĉi malpermeso.

La kristanoj dum kristnasko ne festas je la nomo de l'honoro, sed de l'amo, sed tamen rilate al religio la du festoj iomete similas unu la alian. Certe ni ne oferas nek bestojn nek homojn, sed tamen ni en niaj preĝejoj memoriĝas pri Li, kiu portis la grandan oferon por la homaro, kaj kvankam ni ne hodiaŭ toastas je memoro pri niaj mortintaj bravuloj, ni tamen rememoras la plej unuan kristanan heroon, la martiron *Stefano*. Ni ankaŭ, same kiel niaj idolanaj praavoj, dum multaj tagoj ĝojfestas, ankaŭ ni faras donacojn al amataj geparencoj kaj amikoj, kaj super ĉio la kristnask-sonorilo parolas laŭte pri paco sur la tero.

Vere la kristnasko, kiel kristana memoraĵ-festo, estas historia ligilo inter la plej unua kunfrataro kaj la nuntempaj kristanoj, sed ĝi ankaŭ kiel popola festo estas kunligilo inter la nuntempaj nordaj popoloj kaj iliaj idolanaj praavoj.

*Asta Mikkelsen.*

*Hotel-Adresaro.*  
Odense, Hotel Ansgar.

## Ĉiu Esperantisto

devas aĉeti sapon, parfumon,  
kombilojn, spongojn k. t. p. ĉe

**Anna Petersen**

Vendejo de

Schreiber & Carl Petersen jun.

Tlf. Nora 953 v

Ryegade 32

## Biskvitoj kaj Mielkukoj

Bona biskvito, mastraĵa  
biskvito, sekala biskvito  
kaj mielkukoj.

Skribu al la farejo de

*F. Holle,*  
Aalborg, Danujo.

Laŭpete mi sendas **senpage**  
(se la provizo sufiĉas)  
paketon kun unu el la tri  
artikoloj.

## Ilustrita

## Gvidlibro

## pri Vejle

havebla ĉe

*Eldonejo Esperantista*

Strandgade 11,

Kopenhago.

==== *Prezo: 35 Øre* ====

(aŭ 2 respondkuponoj).

KØBENHAVNS PARAPLYFABRIK

Østergade 58.

**Bastonoj kaj Ombreloj**

**... je ĉiuj prezoj ...**

*Telefon 8610.*

*Telefon 8610.*

## Esperanto-Oficejo

(Esperanto-Kontor) U. E. A.

**Bredgade 35, København.**  
(Kopenhago)

Bela poŝa ŝtampilo (la emblem-  
desegno) kun kuseno.

Prezo: Kr. 2,50 (sm. 1,500).

Ŝtampilo: (la verda stelo). Nur:  
35 Øre (25 sd.).

Kuseno: 35 Øre (25 sd.).


### :: Propagando-markoj ::

(folio po 100 ekz.).

Prezo: Kr. 1,00 (sm. 0,60).

Emblemoj, leterpaperoj, kovertoj,  
poŝtkartoj, silkflagetoj, propagand-  
iloj, k. t. p.

## C. M. Hess, Vejle.



Fornoj laŭ desegn-  
aĵo de konataj  
danaj artistoj en  
plejgranda elekto.

Ŝirmfornoj  
tre elegante  
nikelumitaj.

Kuirfornoj, kaj iz-  
ole starantaj kaj  
por enmurigo kiel ankaŭ  
por hoteloj. Ĉiu speco de  
fandaĵkonstruaĵoj.

**Plej malkara kaj plej  
bona fabrikaĵo.**



## AMATOROJ!

Aĉetu viajn  
fotografajn bezonaĵojn ĉe

**MIMOSA**  
**Kopenhago,**  
Niels Hemmingsensgade 2.



Redakcio kaj Administracio: Strandgade 11, Kopenhago.  
Abonprezo: En Danlando 2 Kr. En eksterlando 3 Kr. po jaro.

